



## Universala Esperanto-Asocio

en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando  
☎ +31 10 436 10 44 📠 +31 10 436 17 51 ✉ uea@co.uea.org

La 25-an de decembro, 2020

Estimata prezidanto de Japana Esperanto-Instituto Kitagawa Ikuko,

Mi salutas vin okaze de niaj festotagoj, kun espero ke post tiom da defiaj situacioj tra la mondo ni ĉiuj ĝuos progreson en la nova jaro. Kvankam ĝenerale por UEA la jaro 2021 aŭguras bone, ni jam konscias pri situacio en via lando kiu bezonos nian zorgan atenton. Pro tio la estraro de UEA deziras konsultiĝi kun la estraro de JEI pri venontaj paŝoj.

Ni eksciis ke morgaŭ kunsidos la Estraro de JEI por konsideri la situacion de la anglalingva revuo "Esperanto", kies unua numero aperis en 10.000 ekzempleroj en via lando la 15-an de decembro. Mi estas informita ankaŭ pri via iniciato aranĝi kunsidon je la 7-a de januaro kun reprezentantoj de la eldonejo, la entrepreno *Gutenberg Orchestra*. Laŭ nia kompreno, tiu kunsido celas esplori la eblecon de kunlaboro por vidigi nian lingvon en ĝia ĵus naskiĝinta revuo. Ni komprenas la kialon de tiu decido, kaj vian esperon ke tiu paŝo povos esti pozitiva okazo por diskonigi nian lingvon pli vaste inter la publiko, en Japanio kaj tutmonde.

En oktobro, s-ro Masanobu Sugatsuke jam anoncis sian intencon aperigi novan revuon por doni forumon pri monda paco, sub la nomo *Esperanto Culture Magazine*, kun la priskribo "A Cultural Magazine for Whole Earth Citizens".

Multaj esperantistoj ricevis la atentigojn de Nitta Takamichi pri problemoj kiujn laŭ li povus kaŭzi tiu elpaŝo. La motivoj de sinjoro Sugatsuke ne estas konataj al ni, do pro tio post sendependa esploro kaj konsultado kun advokatoj ni konkludis jene:

1] Estas en ordo se JEI deziras utiligi tiun okazon por informiĝi pri la ebleco profiti la eldonon de la revuo kaj kontroli, ĉu eblas kunlaboro por reciproka profito.

2] Tamen sendepende de la motivoj kaj celoj de s-ro Sugatsuke, eventuala negocado ne estus je egaleca nivelo, ĉar konata japana eldonisto havas multe pli da influo kaj financa kapablo ol la esperantistoj. Pro tio li kaj lia organizaĵo kapablas regi novajn situaciojn kaj tiel laŭdezire ŝanĝi la publikan bildon pri la nomo kaj idealoj de Esperanto mem, kaj ĝian jam establitan identecon kaj kulturon.

3] Se s-ro Sugatsuke en informaj dokumentoj indikis al JEI siajn intencojn rilate la rolon de la revuo kaj ĝiajn tiurilatajn kulturajn celojn, UEA petas ke JEI dividu kopiojn de tiuj kun UEA por ke ni kaj niaj advokatoj povu informiĝi pri tiuj intencoj kaj iliaj leĝaj sekvoj. La fakto ke la revuo eldoniĝas nur anglalingve kun la intenco ke ankaŭ japanoj akceptu la anglan lingvon kiel internacian prikulturitan komunikilon, devigan por ĝiaj planataj diskutforumoj, estas jam kontraŭindiko de subteno de la ideo de Esperanto kiel transkultura lingvo kaj kulturperanto.

4] Jam s-ro Sugatsuke ekuzis la internacian kopirajton simbolon por sia revuo, kiel oni povas konstati sur la unua numero: "© Esperanto". Se JEI kaj UEA ne protestos tiun uzon, kaj ne mem registris sian propran intereson, nereago povus esti jure interpretita kiel konsento. Se la japana revuo *Esperanto* asertus kopirajton por sia publikaĵo, tio povus atenci la uzon de la nomo por la revuo *Esperanto* de UEA mem, malgraŭ la historia, lingva kaj kultura precedenco.

5] La ĉefa diskuto pri la afero temis ne pri kopirajto (oni kutime ne allasas tion al unusola vorto) sed pri varmarko (en la angla lingvo "trademark", alternative "trade mark" aŭ "trade-mark"). Kvankam tio devus esti leĝe aprobita kaj ne nur asertita, la eventuala uzo de "Esperanto" en leĝe akceptita varmarko kiel ekzemple "Esperanto culture magazine" aŭ "Esperanto-culture" potencie ŝanĝus la jam akceptitan historian kaj sociologian difinon de Esperanto kiel lingvo kaj kulturportanto, kaj povus malhelpi la estontajn agadelektojn kaj sinprezentadojn de organizaĵoj ligitaj al la lingva kaj kultura fenomeno de Esperanto kiel iniciatita de d-ro Zamenhof.

6] Ekzistas alia ebleco kiun ŝajne esploris la organizaĵo de s-ro Sugatsuke, provante registri eventualajn nomojn aŭ titolojn kiuj inkluzivas "Esperanto" ĉe patentita oficejo en Japanio. Necesas atentigi, ke eĉ se oni decidus ke tiaj konsciaj intencaj agoj ne malutilus al Esperanto en Japanio, pro internaciaj traktatoj la registro de kopirajto, varmarko aŭ patento en unu lando povas esti akceptita sen juraj proceduroj ankaŭ en aliaj landoj laŭ partneraj interkonsentoj. Tio estas lastatempa sekvo de ĝenerala terglobiĝemo kiu faciligas transnaciajn intertraktadojn.

7] Pro ĉiuj tiaj konsideroj, kaj ankaŭ aliaj pri kiuj atentigis pluraj kontribuantoj al la ĝisnunaj diskutoj, inkluzive kelkajn kun fakaj scioj, la estraro de UEA, por protekti siajn interesojn kaj la interesojn de la Esperanto-movado ĝenerale, devas insiste peti, ke senkonsidere pri personecoj, JEI ne dependu de la limigita perspektivo de interparolado kun reprezentantoj de *Gutenberg Orchestra*, aŭ de promesoj ne specife interkonsentitaj sur jura bazo por siaj estontaj decidoj.


8] UEA do petas la kunlaboron de Japana Esperanto-Instituto por identigi kompetentan advokaton aŭ firmaon kun fakaj scioj pri la kampo kopirajto, varmarkoj kaj patentoj en Japanio. Ni bezonas unue profesionistojn pri la efektiva potenciala danĝero de la agado de s-ro Sugatsuke kaj lia organizaĵo en Japanio, kaj ĉu povus rezulti akaparo de la nomo, limigo aŭ ŝanĝo de la koncepto aŭ uzado de la nomo Esperanto inter la publiko, aŭ la elektoj kaj agado de la esperantistoj nacie kaj internacie. Due, takso pri la neceso jure protesti kiun ajn provon uzi la nomon "Esperanto" ekster la kunteksto de la lingvo iniciatita de d-ro Zamenhof kun ĝia evoluanta kulturo, kaj eventuale registrado por antaŭmalhelpi kiun ajn postan provon simile agi.

Konklude, kvankam ni bedaŭras la aldonon de tia laboro kaj eventuale elspezoj al viaj taskoj, UEA pretas kunlabori pro la neceso konservi la Esperanto-movadon kaj evoluigi ĝin en la estonteco por atingi la celojn por kiuj ĝi estis fondita.

Ni plene respektas la decidarojn de JEI kiel Landa Asocio de UEA, tamen decidoj okazu kun la konscio ke tiuj influas ne nur la bildon pri Esperanto en Japanio, sed la estontan liberecon de la internacia movado konservi sian karakteron kaj rajton labori por disvastigi la aŭtentan koncepton de Esperanto.

Ni staras pretaj por helpi kaj kunlabori, do atendas raporton pri viaj rekomendoj post la morgaŭa kunsido.

Kun plej elkoraj bondeziroj por la sukceso de via agado kaj por nia kunlaborado,



Duncan Charters  
Prezidanto, Universala Esperanto-Asocio  
[uea-prezidanto@esperanto.org](mailto:uea-prezidanto@esperanto.org)